

KIO ESTAS KOMUNIKADO SEN LINGVO?

La Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1983 "Monda Jaro de la Komunikado". Kion oni volas esprimi per tio klarigas la programa slogano: La pretigo de la teknikaj premisoj por la transsendado de informoj, do, aparatoj por sendi kaj ricevi kable aŭ radie. Al la komunikado apartenas poŝto, telefono, telegrafo, radio kaj televido. La teknikaj rimedoj por funkciigi la komunikadon estas dissemnitaj tre malregule en la mondo. Al la densa reto de tiaj rimedoj en la industriaj landoj korespondas grandaj mankoj en la tiel nomata Tria Mondo.

Oni devas miri, ke estis pretervidita elementon, kiu ja ne estas malhavebla kondiĉo por la funkciigo de la komunikado: la lingva faktoro. Oni povus rigardi kiel tipan signon de nia epoko, ke denove la tekniko staras en la fronto; ke oni opinias povi solvi ĉiujn problemojn per teknikaj rimedoj. Sed kion utilas la plej bona telefonlinio se la parolantoj ĉe la du finoj de la kondukilo ne komprenas sin reciproke? La lingva problemo sur la nivelo de internaciaj konferencoj ja estas solvita, tamen ne kontentige kaj je tre altaj elspezoj, helpe de aro da tradukistoj. Sur pli malalta nivelo tiu metodo fiaskas, ĉar la interparolo de homo al homo estas eble nur, se ambaŭ havas komunan lingvon. La Monda Jaro de la Komunikado staras sur nur unu kruro, pro tio, ke ĝi ne samtempe metis en sian programon la disvastigon de la internacia lingvo Esperanto, kiu sola kapablus enspiri vivon al la nura senspirita tekniko.

- Svisa Esperanto-Revuo.

* * *

Unu el la kaŭzoj, kial oni trovas tiel malmultajn homojn kiuj ŝajnas prudentaj kaj agrablaj en la konversacio, estas, ĉar preskaŭ ĉiu pensas pli pri tio, kion li volas diri, ol pri ĝusta respondo al tio, kion oni diras al li.

- La Rochefoucauld.

SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

P.O. Box 1227, Cape Town.

Prezidento: S-ro E. de Kock.
Vic-Prezidento: S-ro A. von Blottnitz.
Sekretario: S-ro O. Sher.
Kasisto: S-ro C.S. Beckford.
Komitatanoj: S-ino A. Fouché, S-roj H.J. Appel,
J. Hammes kaj F.M. Woolf.

ENHAVOJ

Kio estas Komunikado sen Lingvo?	1
Estraro kaj Enhavoj	2
Internacia Jaro de Komunikado	3
Gravaĵoj	4
La Animstato de la Tornistrulo	5
Tra la Mondo	6
Familia Mozaiko	7
Nuklea Energio - Trilingva	8
Artikolo	9
Trezoroj en Paperkorboj	10
Venteraĵoj	11
Sparu Tempon	12
Ne Mankas Ĝis Nun Riĉuloj	13
Iom Pri Nia Planedo Tero	14
Deziras Korespondi	15
El Nia Gramatiko	16

*

Redaktoro: F.M. Woolf, Box 18, Sea Point, 8060. Tel:
(hejme) 44.2657, helpe de C.S. Beckford, tel: 22.6326,
(hejme) 77.0588.

*

Estas nur lastatempa fenomeno, ke Unesko komencis pri-trakti lingvan dimension en la komunikado interhoma.

Por tion atingi, pluraj anoj el ni strebis - per verkado de leteroj, per vizitoj, per partoprenoj al konferencoj - el Usono, el Svislando, el Parizo. Kaj ne forgesende estas, ke ankaŭ la tempo maturiĝis, ĉar diversaj funkciuloj en la UN-medio havas en si grundon por kompreni niajn argumentojn. Povas facile pasi unu jaro, se ni ĉe-table cerbumas, kiel ni agu. Ni bezonas tujajn, tamen prudentajn agojn.

Jam en la jaro 1982, raportistoj de radio kaj televido kaj ĵurnalistoj kaj gazetistoj en la mondo komencis serĉi ion por informi la publikon rilate al la komunika jaro 1983.

Ili malfermas al ni la pordon.

La gazetaraj servoj de UEA kaj de landaj asocioj povas facile aliri al ili, se ili taŭge faras. Lokaj grupoj povas turni sin al la lokaj amaskomunikiloj.

Okaze de la komunika jaro, ni atingu almenaŭ, ke la publiko konsciiĝu pri la gravaj roloj de lingvoj en la komunikado, pri la ekzisto de lingvaj baroj en la internacia komunikado, pri la esenceco de lingvo en la ĉiutaga vivo, pri senpera komunikilo interhoma por internacia, reciproka komprenado. Eĉ tutan libron pri tiuj temoj ni ja povas verki en propra nacia lingvo. Ni ĉiuj povas havi gravan taskon. La "Internacia Jaro de Komunikado 1983" iĝu por nia movado ia mejloŝtono.

* * *

La eksiĝanta prezidanto de la UN-sembleo, meze de la 1981a septembro, en sia eksiĝa saluto, montris jenajn ciferojn:

* La sumo de la paperfolioj distribuitaj por la Asembleo dum la 1980aj jaraĵoj septembro ĝis decembro estis 236 000 000 folioj. Se tiuj ĉi estus vertikale vicigitaj, la papervico cirkulus kvar kvinonojn de la rondo de la terglobo.

* La kosto de resuma raporto de unu konferenco estas 3648 dolaroj. Ĝia kosto por paĝo superas la jaran enspezon de meza ŝtatano de evoluanta lando. Kaj li diris: La nuna UN estas sufokiĝanta pro tromulto da konferencoj, rezolucioj, dokumentoj.

Unu el la malgrandaj fakaj organizaĵoj de UN taksas, ke, "se ĝi uzus nur unu laborlingvon anstataŭ la nunaj kvin, ĝia regula buĝeto reduktiĝus al 30 ĝis 40 procentoj de la nuna sumo kiel rezulto de la forigo de ĉiuj lingvaj kostoj, kaj rektaj, kaj malrektaj".

UN kaj WIEN: Wien, kiu antaŭ kelkaj jaroj konstruis tutan "UN-urbon" efektive fariĝas grava regiona centro de Unuiĝintaj Nacioj. Tie nun laboras pluraj fakoj de la monda organizaĵo kaj ĉiam pli ofte okazas gravaj internaciaj konferencoj. Tial UEA antaŭ kelka tempo nomis d-ron Hans Michael Maitzen, iaman prezidanton de TEJO, esti la konstanta reprezentanto de la Asocio ĉe la UN-centro en la aŭstria ĉefurbo. Preskaŭ samtempe kun la 57a UK en Antverpeno komenciĝis en Wien Monda Asembleo pri Maljuniĝo, al kiu UEA sendis d-ron Maitzen kiel sian reprezentanton. Ankaŭ alia Esperantisto, d-ro James Lieberman (Usono) ĉeestis parton de la Asembleo. Tuj post ĉi tiu asembleo okazis en Wien alia UN-konferenco, kie UEA partoprenis pere de la sama reprezentanto. Temas pri "Unispace-82", kiu traktis la utiligon de la ekstera spaco, kaj estis pli proksima al la profesio de Maitzen (li estas astronomo), kiu tre aktive partoprenis en la konferenclaboro.

MODERNLINGVA ASOCIO DE USONO: En la jarkunveno de tiu asocio jam delonge Esperanto estas ofta temo. Lastjara kunveno, kiu okazis de 27-30 Decembro en Los Angeles, enhavis ankaŭ sesion sub la titolo "Esperanto kiel Enkonduko al Lingvostudado". La sesion prezidis Dorothy Holland. La prelegantoj estis d-ro R. Blair kaj A. Eikenberry.

EVA: La mallongviva Internacia Verkista Asocio, fondita en 1957, kaj malaperinta baldaŭ post tio, estas revivigita dum la UK en Antverpeno. La 29an de Julio kunvenis 15 konataj Esperanto-verkistoj, tradukistoj kaj kritikistoj, por refondi sian fakan asocion. La nova asocio havos la nomon Esperanta Verkista Asocio (EVA), kaj havos kiel celoj a) okupiĝi pri la plifirmigo de lia profesia statuso, b) influu la literaturan kaj eldonan politikon en Esperanto, kiam tio montriĝos necesa, kaj 3) kontribui al la rekono kaj disvastigo de la Esperanto-Literaturo en neesperantistaj rondo.

* * *

La espero, kiel ajn trompa ĝi estas, utilas almenaŭ por konduki nin al la fino de la vivo per agrabla vojo.

* * *

Sciîginte ĝisfunde koncerne ĉion konendan kaj havendan por la piedvaga ekskurso, la tornistrulo priatentu unu plian, gravan aferon, nome, sian animstaton. Nur tion farinte estas li preta komenci sian ekskurson. Li memoru atenti tie, kun interna maldormo, kie la montosilento aŭdebliĝas pro la ventosusuro, kaj kie la arbar-senbruo - ornamita per siaj internaj sonoj kaj birdkantado - fariĝas perceptebla; tie, kie la sorĉado de la lumo ĉion admirindan rivelas.

Estas ankaŭ tie, en la preskaŭ sentebla silento, kaj en la profundeco de sia koro, kie li konsciiĝas pri la ĉeesto de la Kreinto. Estas aparte tie, kie li kelktempe rigardas en la malproksimon, aŭ kie li revas dummomente, ke la Kreinto ebligas paroli kun li, kaj li tiam konsciiĝas, ke li ne troviĝas sola.

Li memoru, ke okazis en la Edena Ĝardeno, kie la Kreinto alparolis la Homon, kaj ke estis sur la Monto Sinajo kie la Kreinto alvokis kaj parolis kun Moseo. Kaj ke estis sur la Oliv-monto en la Ĝardeno Getsemano, kie preĝis Kristo Jesuo. Li nun troviĝas ĝuste tie, antaŭ la pompo de la naturo, kiun nur la Kreinto kapablis esti, ke la tornistrulo, sur sia piedvaga ekskurso, jarcentojn poste, nun povas ĝissate admiri ĉion videblan ĉirkaŭ li; kie li kelkmomente paŭzas por ripozi kaj aprezi la belecon ĉiudirekte, aŭ por lasi liberan kuron al sia fantazio, kaj sentas kaj akceptas kun dankemo la ĉeeston de sia Kreinto, sciante, ke ĉio tio estas nur pro Lia krea laboro, kaj sekve serioze kaj konfide direktas siajn pensojn al

La Preĝo de la Tornistrulo:

Mia tri-unua Patro, mi dankas Vin pro Via nerefutebla kaj neevitebla ĉie-esto, kaj por la beno kaj forto, kiujn ĝi alportas al mi.

Miaj okuloj observu la belecon de via kreaĵo,
Kaj mia menso aprezu la miron de via faraĵo,
Kaj mia koro trovu ripozon en la fakto, ke Vi estas ĉe mi.

- Amen.

(Ensendis J.L. Jooste, Box 87, Hartenbos. 6520. Noto: Kopirajto permesata al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la bonfarto de la tornistrulo. Estas lia humila provo servi al Dio).

AŬSTRIO: En la nova viena telefon-libro estas menciita surbendigita kurso de Esperanto (paĝo 6; numero 1519).

BRITUJO: Sepdeka datreveno de la Esperanta Diservo Londona okazis last-oktobre. Estis s-ro M.C. Butler, kiu komencis tiujn servojn en Oktobro 1912 kaj ankaŭ en tiu periodo eldonis la libron "Himnaro Esperanta", kiun li kompilis.

ĈEĤOSLOVAKIO: Pli ol 200 novaj membroj aliĝis ĉijare al Asocio de Esperantistoj en Slovaka SR. En la klubo por pedagogoj-pensiuloj en Bratislava funkcias, krom aliaj rondetoj, ankaŭ Esperanto-rondeto.

ĈINIO: Ĉirkaŭ 60 000 personoj lernas la internacian lingvon. La 20.06.1982 fondiĝis Esperanto-Instituto en la gubernio Huaide, Jilin-Provinco.

FRANCUJO: La francaj telefon-libroj aperigas adresojn kaj telefon-numerojn de 48 Esperanto-instruistoj en 26 departementoj. Pro partopreno en filatelaj ekspozicioj aranĝitaj en Vesoul kaj Perpignon, s-roj Thiebaut kaj Amoureux ricevis bronzajn medalojn, fako 'Esperanto'.

GERMANIO (FRG): Kadre de vesperaj kurs-programoj funkcias en Berlin-Schöneberg nova Esperanto-rondo laŭ la moto "La dua lingvo por ĉiu".

HISPANIO: "Petete", nova revuo pri edukado kaj instruado en kastilia lingvo por infanoj, enhavas vortaron en 10 lingvoj, inkluzive de Esperanto.

JAPANIO: Aktivas en la lando 80 Esperanto-rondoj kun ĉirkaŭ 4 000 membroj. La ĉi-jara Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazis en la urbo Kamakura, 28-29 Okt, kunula ĉeesto de 320 japanoj kaj 24 ne-japanoj el 9 landoj. D-ro Sugita Masaomi ricevis premion pro lia 50-jara strebado disvastigi Esp-on kiel internacian komprenilon kaj gvidado de Esperantistoj en la gubernio Mijakazi kaj ĉirkaŭaj gubernioj.

DIVERSAĴOJ: Ulrich Lins, komisiito pri eldonado de UEA vizitis Ĉinion kaj faris interkonsenton pri presado de libroj por UEA.* En Namur, Belgio, de 23-28 Aug. 1982 okazis jubilea, 10a internacia Kongreso de Kibernetiko. La laborlingvoj estis la angla, franca kaj dufoje la Internacia Lingvo Esperanto.*

En Smithfield (Usono), dek kvin virinoj 'strikiis' kontraŭ siaj edzoj ĉar ili ricevis tro da laboro en la hejmo kaj opiniis, ke tiu laboro estas subtaksata. Dek du el ili finis sian strikon nur post kiam la edzo promesis plibonigi la situacion. 'Mia edzo nun tiom atentis min, ke mi ne plu scias, kion mi povas fari. Li helpas ankaŭ en la dommastrumado kaj forigas siajn proprajn malordonojn', diris la 20-jara Terry Waterman. La iniciatinto Gloria Gangi kaj du aliaj virinoj daŭrigis sian strikon, kvankam ankaŭ ili estis pretaj akcepti kompromison. Diris Gloria: 'Mi ricevis multajn kuraĝigajn telefonvokojn, sed ankaŭ idiotajn proponojn de viroj, kiuj simple volas 'amuziĝi' kun ni'.

En Svedujo, antaŭ 15 jaroj, 14,6 procentoj de la ĵusnaskitoj ne havis geedziĝintajn gepatrojn, kompare kun 33% en 1976 kaj 41% pasintjare.

Kvankam la nombro de geedziĝoj iomete plialtiĝas dum la lastaj kelkaj jaroj, la ofteco de geedziĝo plonĝis en la sepdekaj jaroj, dum la nombro de eksgeedziĝoj kreskis. En 1969, 49 000 paroj geedziĝis kaj 12 000 geedziĝoj finiĝis. Post dek jaroj la nombro de geedziĝoj falis ĝis 40 000 sed 21 000 paroj eksgeedziĝis.

Statistikoj montras, ke ankaŭ kunloĝantaj paroj estas nestabilaj, precipe en la kazo de gejunuloj. Registara esploro montris, ke 5% de needziĝintaj svedinoj kunloĝis kun pli ol unu viro antaŭ la 20a datreveno.

Fakuloj taksas, ke en la sekse libera Svedujo, pli ol 99% da homoj kunloĝas antaŭ la geedziĝo. Oni konsideras tiun fenomenon tute normala. Fakte, estas ekstreme malnormale, ke svedoj geedziĝus ne antaŭe kunloĝinte.

Laŭ registara raporto, ĉirkaŭ 20% el ĉiuj kunloĝantaj paroj ne estas geedzoj.

Promenante tra la urboj de DR Germanujo, oni ne povas ne vidi la junajn parojn kiuj, precipe en la somero, butikumas aŭ veturigas infanĉarojn. Tra la stratoj ĉiam migradas infanĝardenistinoj kun siaj zorgatoj, junaj virinoj kun infanoj, junaj geamantoj. Evidente la emo generi kaj naski idojn daŭre kreskas, malgraŭ la eblecoj uzi LA pilolon, aŭ lege abortigi.

-El 'Kontakto'.

Many people are concerned about the risk of being harmed by radiation from the nuclear power industry. In fact the risk is minute. For example, in America commercial nuclear power generation has a history of more than 25 years and no member of the public has died from radiation - not even at Three Mile Island.

Although the hazards associated with nuclear power generation are smaller than those associated with many industrial undertakings, the nuclear industry has devised a comprehensive safety programme to protect the public. Simple precautions have been prepared to ensure the safety of all those living in the Koeberg area in the unlikely event of a release of radiation at the power station. The reason most of us are concerned about radiation is because we cannot see it. We think of radiation as an invention of scientists working in laboratories with no contact with real people and not worried about the final results of their efforts. Nothing could be further from the truth.

Multaj homoj estas maltrankvilaj pri la risko de difekto pere de radiado el la industrio koncerne nuklean potencon. Fakte, la risko estas malgrandega. Ekzemple, en Usono, la generado de komerca nuklea potenco havas historion de pli ol 25 jaroj, kaj neniu civitano ĝis nun mortis pro radiado, eĉ ne ĉe Three Mile Island.

Kvankam la danĝeroj ligitaj al la generado de nuklea energio estas pli malgrandaj ol tiuj ligitaj kun multaj industriaj entreprenoj, la nuklea industrio evoluigis ampleksan sekurec-programon por protekti la publikon.

Simplaj antaŭgorgoj estas pretigitaj por certigi la sekurecon de ĉiuj, kiuj loĝas en la Koeberga regiono rilate al la nerverŝajna okazo de liberiĝo de radiado ĉe la elektra centralo.

La kialo pro kiu la plimulto el ni estas maltrankvilaj koncerne radiadon estas pro tio, ke ni ne povas vidi ĝin. Ni pensas pri radiado kiel inventaĵo de sciencistoj deĵorantaj en laboratorioj sen ia kontakto kun realaj homoj kaj kiuj sin ne ĝenas pri la rezultoj de siaj klopodoj. Nenio povas esti pli malproksima de la vero.

Baie mense is besorg oor die moontlikheid dat hulle 9 iets kan oorkom van straling van die kernkragbedryf. In werklikheid is die risiko uiters gering. In die VSA word kernkrag nou reeds 25 jaar op grootskaal ontwikkel en in dié tyd het nie 'n enkele lid van die publiek aan kernstraling gesterf nie - nie eers by Three Mile Island nie.

Baie ander nywerhede hou veel groter gevare vir die publiek in as die ontwikkeling van kernenergie. Maar die kernbedryf het 'n omvattende program opgestel om die publiek te beveilig.

Eenvoudige voorsorgmaatreëls is bedink om die veiligheid te verseker van almal wat in die omgewing van Koeberg woon as die onwaarskynlike ooit sou gebeur en straling by die kragentrale uitgelaat word.

Die meeste van ons is begaan oor straling omdat ons dit nie kan sien nie. As ons aan straling dink kom die beeld by ons op van wetenskaplikes wat in laboratoriums proefnemings doen sonder om hulle in die minste te steur aan die gevolga van hul werk. So 'n opvatting hou egter geen verband met die werklikheid nie.

* * *

NEKROLOGO. En Portugalio mortis, 1982.12.27, nia membro S-ro Mario Raposo, kien, post multjara foresto li reiris. S-ro Raposo multe aktivis en Mozambiko en la Esperanto-movado. Li estis ano de nia asocio inter 1970 kaj 1979. Dum tiu tempo, loĝante en Sudafriko, li ofte ĉeestis kunvenojn de la Johannesburga Esperanto-Societo. Post sia reveno al Portugalio li restis abonanto de Bona Espero. Ĉiuj sudafrikaj Esperantistoj etendas siajn kondolencojn al liaj familianoj.

* * *

MONDA JAMBOREO EN KANADO. Pro anonima donaco, Skolta Esperantista Ligo povas nun lanĉi konkurson kun allogaj premioj. Temas pri la sumo de po 200 kanadaj dolaroj por 25 skoltoj, kiuj plej bone kapablos paroli Esperanton kiam ili atingos la Mondan Jamboreon en Julio, 1983 en la kanada provinco Alberta.

La ĉi-kuna letero estis sendita el Usono al s-ro Marreiros en Johannesburgo, kiu transdonis ĝin al ni por publikigo en BE. Tion ni kun plezuro nun faras esperante, ke la klopodoj de niaj membroj estos fruktodonaj.

S-ro M. Marreiros, 97 Eastweg, Regent's Park, Joh.burg. Ĉu vi scias, ke estas trezoroj en paperkorboj?

Post dujara vizitado al kvin oficejoj en nia urbo, kie mi kolektis kovertojn de perpoŝte ricevitaj leteroj kaj paketoj, mi nun havas grandstokon da uzitaj usonaj poŝtmarkoj, inkluzive de memorigaj, regulaj, malnovaj, alt-prezaj, ktp. Tiuj nun estas pretaj por interŝanĝado kontraŭ tiuj el aliaj landoj.

Nun vi sendube demandas, "por kio"?

Kunlaborante kaj samcele kun la hodiaŭa poŝtmarkvendado en Eŭropo, mi intencas starigi vendprogramon en Usono. Do, finfine eblos ricevi iom da mono el paperkorboj por donaci al UEA.

Samtempe mi intencas sendi esperantajn propagandilojn al ĉiuj mendontoj; povas esti, ke kelkaj el ili iĝos Esperantistoj. Jen la plano.

Kompreneble mi bonvenigus kontantan helpon en tiu plano. Mi jam korespondas kun iu s-ro de Geus, kiu prizorgas la vendadon en Eŭropo kaj bonvenigas tiun helpon.

Tial mi skribas al vi, esperante, ke en via lando estas entuziasmuloj kiuj volas helpi. Ĉar mi estas emeritulo mi trovis, ke tiu malpeza laboro estas bonega kaj interesa okupado.

Mi antaŭdankas por la anoncado de ĉi tiu plano en via bulĉeno aŭ al individuaj membroj. Interesuloj bonvolu skribi rekte al mi. Esperplene mi anticipas baldaŭajn respondojn.

Samideane,

William J. Mets,
4128 C Via Andorra,
Santa Barbara, Ca. 93110, USA.

* * *

EL NIA PROVERBARO Diru la veron, eĉ se ĝi estas kontraŭ vi.* Ne ĉiu, kiu havas okulojn, vidas pere de ili.* Kiu konsideras ĉion facila, tiu falos en malfacilojn.* Domo, kiu ne havas vizitantojn, estas malfeliĉa domo.* Multaj amikoj ne taŭgas, eĉ por tetrinkado.*

Ie en la provinco Transvalo (Sudafriko) loĝis vidvino, kiu decidis geedziĝi kun junulo pli juna ol ŝi. Ordinare, tio ja estas io, kio relative ofte okazas, sed ĉi-foje temis pri ino 29-jara kun kvin geidoj kaj 15-jara junulo. Pro tio, ke li estis tiel juna, necesiĝis, ke li unue akiru registaran permeson por la geedziĝo. Laŭdire la du familioj kune loĝis en la sama, iom granda domo, kaj pro tio estis eble al li daŭre esti en la ĉesto de la vidvino kaj enamiĝi al ŝi.*

Generale, oni ankoraŭ memoras, ke Idi Amin, la Uganda diktatoro, dum la Jam Kipura milito, telegrafis al s-ino Golda Meier rapide enpaki siajn kalsonojn kaj minijupojn kaj fuĝi al Usono, antaŭ ol alvenos Idi Amin kaj lia sentima armeo por helpi al siaj arabaj fratoj!

Nigrulo de urbeto apud Kaburbo, iu Ezra Munwete, skribis leteron al la loka gazetaro, ke la pavianoj de la proksima sovaĝbestejo havas pli da cerbo ol Idi, kaj cetere estas pli belaspektaj. Li daŭrigis, ke se Idi ne loĝus en senadresa arbo, li ŝatus persone skribi al li! *

Pasintece, la sudafrika kamparo estis loko de vigla juda vivo. Preskaŭ ĉiu urbeto havis sian sinagogon ("ŝul"-on). Grandaj nombroj de pogrom-fuĝintoj el Rusujo konstante migris ĉi-tien kaj estis respektplene traktitaj kiel la Popolo de la Biblio. Ekzemple, la urbeto Koppies (Liberŝtato) pasintece estis eta Tel Aviv. Ĉiuj komercejoj, krom kvar, estis posedataj de Judoj. Kvar butikistoj nomiĝis Ginsberg. La kuracisto, la tajloro, la ŝuriparisto estis judaj, samkiel ulo - "forta kaj sencerba kiel bovo" - kiu ŝarĝis kaj malŝarĝis veturilojn. Mankis nur judaj magistrato, policisto kaj romprabisto por 100 procenta tutjuda komunumo! *

- Ĉerpitaj el diversaj fontoj ensendis
E.S. Venter.

* * *

Pri la belga Esperanto-poŝtmarko, 400 000 filatelistoj ricevis apartan informilon, publikigitan en la nederlanda kaj la franca lingvoj. Ankaŭ en la revuo de belgaj fervojoj (500 000 ekzempleroj) aperis tutpaĝa artikolo.

- Sparu tempon por labori
 - ĝi estas la prezo de sukceso.
- Sparu tempon por pensi
 - ĝi estas la fonto de potenco.
- Sparu tempon por preĝi
 - ĝi estas la sekreto de revelacio.
- Sparu tempon por ludi
 - ĝi estas la sekreto de juneco.
- Sparu tempon por legi
 - ĝi estas la fonto de saĝeco.
- Sparu tempon por esti bona
 - ĝi estas la vojo al feliĉo.
- Sparu tempon por sonĝi
 - ĝi estas la vojo al la luno.
- Sparu tempon por ami
 - ĝi estas la privilegio de dioj.
- Sparu tempon por servi
 - ĝi estas la tasko de la vivo.
- Sparu tempon por ridi
 - ĝi estas la muziko de la animo.

(De nekonata aŭtoro. Elangligis Phyllis Goodheir. El La Brita Esperantisto).

* * *

Dum aŭgusto 1982, ege aĝa, mortis ĉefestro Sobhuza de Swazilando (oni kutimis nomi lin Reĝo Sobhuza). Laŭ antikvaj moroj tiam okazis oficiala funebro, kiu venis al fino la 3an de Oktobro.

Dum tiu funebra tempo estis malpermesite plugi. Post longa tempo de nepluveco, ĝuste dum tiu ĉi funebra tempo bone pluvis. Malgraŭ granda respekto je la mortinta "rego" oni deziris plugi kaj prosemi la teron por eviti tutlandan malsaton, sed tion farante oni riskas iri malliberejen aŭ pagas monpunon. Same ĉiuj viroj kaj ĉiuj patrinoj - kaj edzinoj, kaj fraŭlinoj - forrazu siajn harojn dum la funebra tempo. Nombro da homoj devis pagi monpunon pro malobeo. La plimulto estis Atestantoj de Jaŭve, kies religio tion malpermesas.

- Ensendis E.S. Venter.

La reganto de la petrola emirujo "Katar" vizitas ĉiusomre Genevon en Svislando. Li dungis por tiu celo la luksan hotelon "Noga Hilton", pagante 200 000 svisajn frankojn. Li venis tien kun kvar edzinoj, ses kromedzinoj, 14 infanoj, 6 servistoj, 2 ŝoforoj kaj nekonata nombro da personaj gardistoj, kaj avino ...

La infanoj ricevis de la reganto rulsketilojn kaj de tiu tempo komencis ekzerci tiun sporton sur la koridoroj de la hotelo. Parenteze: La infanoj sukcesis tute detruigi la ledan kovraĵon de ĉiuj apogseĝoj en siaj ĉambroj kaj en komunaj salonoj per siaj poŝtranĉiloj.

Oni ne povas nei, ke tamen estas progreso en ilia edukado. En la lasta jaro ili jam lernis manĝi ĉe tabloj kaj ne sur la planko. Krom tio ili komencis ankaŭ kartludi. Ĉiu infano ricevis por tiu celo paketon da bankbiletoj de 500 svisaj frankoj.

Tio konfirmas, ke la tria mondo rapide lernas de Eŭropo kiel progresi.

La pikanta detalo de tiu ĉi afero estas la fakto, ke la supremenciita hotelo apartenas al Judo, kaj pro tio estas kondamnita je araba bojkoto.

- Israela Esperantisto.

* * *

VETERANA ESPERANTISTA KLUBO: Atentu mondaj ge-esperantistoj, lerninte Esperanton antaŭ 1948! Okaze de la 100-jara jubileo 1987 VEK provos registri ĉiujn vivantajn ge-esperantistojn, kiuj restis fidelaj al nia movado. Skribu tial vian nomon, naskiĝjaron, E.-aliĝon, landon kaj urbon al Julie Winter, Obere Str. 8, D-3549, Wolfhagen 1, Germanujo. Ĉiu membro povas kolekti la nomojn de la koncernaj Esp.istoj en sia proksimeco. Por ke mi povu raporti pri la rezulto dum nia kunveno en Budapeŝto, mi petas vin sendi al mi la listojn ĝis Junio 1983. Se al vi estas eble por tiu ĉi kolektado ankaŭ konvinki samideanojn aliĝi al VEK, mi petas skribi la tutan adreson kaj enmeti ankaŭ foton kaj Esp. vivokuron. Bonan sukceson!

* * *

En la universitato de la urbo Provo (Utah), Usono, d-ro R. Blair instruas E-on al 80 personoj. Aliĝis tiel multe da studentoj, ke ne estis eble akcepti ĉiujn interesulojn.

* * *

La tero cirkulas sur la tria orbito ĉirkaŭ la suno. Ĝi estas la unusola planedo en la universo sur kiu estas pruvita la ekzisto de la Vivo mem. La internon de la tero ni ne konas pli bone ol la internon de aliaj planedoj. Mankas rektaj observadoj. Ĉiujn informojn ni devas atingi el observadoj de la surfaco de nia planedo kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo.

Bone konata parto de la terglobo estas ĝia supraĵo. Dum jarcentoj la homoj klopodis la teran supraĵon ekkoni, priskribi kaj kartografi. El mapo de la tero en malgranda skalo estas tuj videble, ke la supraĵo de la tero estas tre nesimetria. La plimulto de la kontinentoj estas amasigita sur unu duonglobo, preskaŭ tutan duonglobon okupas la Pacifika Oceano.

La tera atmosfero estas post la supraĵo la dua plej bone esplorita parto de nia planedo. La homon plej multe interesas la plej subaj tavoloj de la atmosfero, de kiuj dependas lia vivo. La tera atmosfero, ĝiaj kemiaj kaj fizikaj ecoj, estas la ĉefaj kondiĉoj por ekesto kaj evoluo de la vivo.

La tero apartenas al 5 astrokorpoj de nia sunsistemo pri kiuj ni scias, ke ili havas sian propran magnetokampon. Dum tre longa tempo la homoj pensis, ke la tero senmove staras, kaj ke la tuta universo rotacias ĉirkaŭ ĝi. Nur dum la 17a jarcento ekatingadis astronomio kaj fiziko observojn klare pruvantajn, ke la tero ne tiel staras.

Hodiaŭ ni scias, ke ĝi faras pli ol dek diversajn movojn. La plej karakteriza estas la rotacio; ĝi turniĝas de okcidento al oriento unufoje dum 23 horoj, 56 minutoj kaj 4 sekundoj. Ĉirkaŭ la suno cirkulas la tero sur orbito en formo de tre malmulte ekscentra elipso. La tempo de cirkulo ĉirkaŭ la suno estas unu jaro.

La malplej rapida movo de la tero estas reciproka movo de kontinentoj (nur kelkaj centimetroj dum jaro); la plej rapida estas movo de la tero kune kun la aliaj planedoj kaj la tuta sunsistemo ĉirkaŭ kerno de la galaksio. Ĉirkaŭ ĝi movas la tero per rapideco de 247 kilometroj dum unu sekundo.

(El artikolo en gazeto Scienco kaj Tekniko).

Karaj ges-anoj,
Mi estas 20-jara studento pri lingvistiko kaj sufiĉe malnova Esperantisto. Jam de longe mi ŝatus korespondi kun Sudafrikan(in)oj kaj preferas turni min rekte al la Landa Asocio. Do, mi dankas se vi povos helpi min. Mi ŝatus korespondi kun afrikans-parolantoj, ĉar mi planas lerni tiun lingvon, kaj, se eble, kun junul(in)oj, pri ĉiuj temoj, kompreneble. Plue, mi ege dankus, se vi sendus al mi ekzempleron de via Bona Espero. Sudafriko estas al mi tre alloga lando, kaj mi do ŝatus scii pli pri la Movado tie.
Mi denove dankas kaj atendas respondon. Sincere,
José B.M. Moraes, Caixa Postal 274, 13 500 Rio Claro SP, Brazilo. (Iom mallongigita).

Tre karaj kaj estimataj membroj de SEA,
Mi estas 50-jara tajloro, esperantistiĝis antaŭ 5 jaroj. Mia hobbio estas skribi leterojn Esperantajn kaj aŭskulti la radion. Tre plaĉas al mi la elsendoj el Afriko, kaj do decidis skribi al via asocio, petante ĉu iu volus skribi al mi pri Afrikaj temoj kaj interŝanĝi p.markojn kaj bildkartojn. Mi interŝanĝas leterojn kun ĉiuj kontinentoj, sed mankas al mi tiuj el la granda, nigra afrika kontinento.

Atendante respondon mi sincere salutas vin ĉiujn en malproksima Afriko.

P.S. Al pozitiva samidean(in)o mi sendos mian foton. Senpacience, via pola amiko Henryk Zygovski, UL Główna 22, 89-500 TUCHOLA, Pollando.

* * *

Ŝajne aĉetante, mangestas la ĉefo al la aŭdaca dekoltaĵo de kolegino Ginjo:

- Tiu ĉarma, ĝi estas verŝajne por vendi, ĉu ne, sinjorino?
- Ho ne, sinjoro, nature ne!
- Tiam bonvolu tuj ĉesi la varbadon, sinjorino, Ginjo!
- Erare vi asertis, ke Klara estas ankoraŭ sensperta ineto; jam ŝi naskis fileton nur tri monatojn post la edziniĝo - grumblis junulo.
- Nu, videble, ke mi pravis!

DAŬRI, DAŬRIGI: En la revuo Esperanto oni trovas la frazon: la strebado daŭros resti nur sporadaj provoĵ. Tiu frazo estas kritikinda el du vidpunktoj. Unue, jam en sia Lingva Respondo N-ro 49 Zamenhof avertis, ke oni ne uzu la formon DAŬRI...I, konsilante anstataŭe PLUE...I aŭ, en taŭga kunteksto, DAŬRIGI kun verba substantivo; ekz: MI DAŬRIGAS LA LABORON anstataŭ MI DAŬRAS LABORI. Due, la esprimo DAŬROS RESTI ŝajne neniom aldonas al la signifo de la simpla RESTOS, kiu laŭ Plena Vortaro signifas DAŬRE ESTOS. Se la verkin-to de la artikolo tamen uzis la pleonasman formon intence, por pli emfazi la nuancon, li tion esprimus pli taŭge per PLUE RESTOS.

BALANCI, BILANCO, SALDO: Ne malofte oni trovas la vortojn BILANCO kaj BALANCI malĝuste uzataj. BILANCO estas listo aŭ tabelo, kiu montras la aktivajn kaj pasivajn saldojn de la kontoj (angle: balance sheet). BILANCO sekve ne listigas la elspezojn kaj enspezojn (por kio oni preparas SPEZOKONTON aŭ GAJNOPERDAN KONTON, angle: profit & loss a/c), kaj oni sin gardu kontraŭ tia misuzo de BILANCO. BALANCI signifas STARIGI (tio estas: prepari) BILANCON. BALANCI signifas RITME MOVI SUPREN-MALSUPREN; ekz: ONI BALANCAS LA KAPON POR JESI sed ne en ĉiu lando!); la vorto havas nenian semantikan rilaton en Esperanto kun BILANCO.

SALDO estas la diferenco inter la debeto kaj kredito en konto; SALDI signifas kalkuli tiun diferencon, kaj enskribante la saldon, oni ekvilibrigas la konton. (Angle SALDO - balance; saldi - to balance).

POSTO, POSTOFICEJO: Mi rimarkis, ke anglaj Esperantistoj, sendube pro la influo de la nacia lingvo, tre ofte uzas la formon POSTOFICEJO ĉe okazoj, kiam la EJO havas nenian rilaton kun la kunteksto. Se, ekzemple, oni volas aĉeti poŝtmarkojn, oni ja normale iras en POSTOFICEJON; tio estas - en lokon, kie laboras antaŭ la publiko diversaj poŝtkomizoj kaj, post la kulisoj, aliaj poŝtistoj. Sed se temas pri la institucio, oni parolu simple pri la POSTO.